


El "Ludu Goon VIII" turniro sur OGS - 4

"Ludu Goon IX" turniro en grupejo "Esperantejo" sur OGS Go-servejo (<https://online-go.com/group/137>) finiĝis en lasta februaro. Nun prezentas analizon por tre frua etapo de unu partio el la turniro, ludita inter KYUUaj partoprenantoj.

Se vi havas konekton al la inter-reto, vi povas postludi la ludon ĉe jena ligilo;
<https://online-go.com/game/48414422>




Por analizo mi uzadas Arte-faritajn Inteljektojn, el kiuj unu estas nomita "入神の囲碁" (NYUUSIN NO IGO, mallongigo "NI"), kiu signifas "GOo de En-di-iĝanto", kaj la alia estas. "Leela Zero" (mallongigo "LZ").

Laŭ vidpunkto de amatora DANNulo, estas pluraj malbonaj kaj dubindaj ŝtonmetoj.

N23 estas malbona perdante eblecon por pligrandigi la kvazaŭ-teritorion en la Dekstra rando, per N24 ktp.

B26 estas malbona, ĉar pli efika estas B27.


N29 estas malbona, ĉar Nigro devus sin-ligi per N30.



Sekve esploroj por la dubindaj ŝtonmetoj estas montritaj.

Unua demando: Kontraŭ N13, ĉu Blanko devus respondi ĝin aŭ disvolviĝi al Supra rando?

Laŭ la AĴoj, pli grave estas etendi la triopajn ŝtonojn en la SupraDekstra angulo, devigante nigron resti malalte en la Dekstra rando.




Dua demando: Post la ‘diagonaliganta-tuŝmeto’ N17 kaj stariĝo B18, Kien Nigro devus ŝtonmeti?

Interese, ambaŭ AIOj taksas ke preskaŭ samvaloraj estas ŝtonmetoj en la SupraMaldekstran angulon, la SupraDekstran angulon, kaj la MalSupraDeksra angulon.

Tamen la taksitaj eblecoj por venko estas iome malsamaj;


-NI: Nigro estas iome avantaĝa,

-LZ: Preskaŭ egalaj.




Laŭ LZ, ne malbona estas la supren sin-etendo en la SupraDekstra angulo. (originala N19)

La procento por venko montrita (46.7%) estas preskaŭ sama al aliaj sugestitaj ŝtomnetoj.



Tria demando: Kontraŭ Nigra sin-etendo N19, Ĉu Blanko gardi siajn triopajn ŝtonojn en la SupraDekstra angulo aŭ ambaŭflanken ataki la nigron en la SupraMalDekstra angulon?


Laŭ la AIOj, pli grave estas ataki la SupraMalDekstran angulon.



Laŭ NI, post la ambaŭflanka atako al la SupraMaldekstra angulo, pli grave estas monopolumi la MalSupraDekstran angulon per B22.

Kaj se Nigro tranĉas per N23 en la SupraDekstra angulo, Blanko devus volonte oferi la triopajn ŝtonojn kaj antaŭe ŝtonmeti sur iun el gravajn punktojn montritajn ruĝe.

Post la forkapto per N27, la nigra formo en la SupraDekstra angulo estas tro forta, do la efikeco de nigraj ŝtonoj estas malalta.




Bonvole revidu la registraĵon en la unua paĝo.

Laŭ LZ, anstataŭ la Blanka diagonaliĝo B34, Blanko devus rektanguliĝi kiel montarita en la mandekstra diagramo.

Oferante unu ŝtonon en la Dekstra rando, Blanko limigis la Nigran teritorion, kaj faras tre grandan kvazaŭ-teritorion en la MalSupra rando.

Kontraŭ Nigra invadanto N20, Blanko povas ataki ĝin kaj regi la centran kampon kaj la MalDekstra rando, se Blanko estas sufiĉe lerta.



Ankaŭ la sekva Nigra meto devus esti sur la saman lokon


Sekve, por Blanko ankoraŭ grave estas ataki la nigron en la SupraMalDekstra angulo.

LZ montras interesan varion.

Bonvole ĝuu la procedon proponitan.

MORI Hitosi

Go-ekzercaro por Komencantoj (30)



Profesiulo: Kion vi intencis, kiam vi ŝtonmetis ek de ĉapelo N1 sieĝante la blankan ŝton-grupon?

KYUUulo: Mi volis ataki la blankan ŝtonon kaj intencis malebligi blankon sinligi al ŝtono ▲.

Porf.: Mi komprenas vian intencon, sed en la rezulto la Blanka ŝton-grupo facile vivas.

K-ulo: Mi hezitas ŝtonmeti sur punkton 1 aŭ 2.

Porf.: Pli bone estus N2 por ataki

la blankan ŝton-grupon.


K-ulo: Tamen mi timis ke blanko unupunkte saltus kiel B1 dividante nigrajn grupojn.

Porf.: Eĉ se dividitaj, la du nigraj ŝton-grupoj estas sufiĉe fortaj. Kaj Blanko ne povas facile sin-ligi siajn ŝtonoj pro la malproksimeco.


K-ulo: Mi nun komprenas. Kion mi timas...?

(Adaptita artikolo citita el “Kreskada noto de AMIGO” en japana ĵurnalo “Semajna GOo”)

La problemo 283-a
Nigro havas meton.



La problemo 284-a
Nigro havas meton.



La solvo 283-a

Nigro povas sinvivigi.

Fig. 1-a: Sukceso. Esenca estas N-1. Kontraŭ B-2, Nigro povas lavangkapti la blankon per N-3.

Fig. 2-a: Vario. Kontraŭ Blanka rezisto B-2, Nigro povas detrui blankan maldekstran okulon per N-3.




Fig. 1-a




Fig. 2-a

La solvo 284-a

Nigro povas mortigi la blankon.

Fig. 1-a: Sukceso. Esenca estas N-1. Kontraŭ B-2, Nigro povas sinligi per N-3.

Fig. 2-a: Malsukceso. Malbona estas N-1. Ek de B-2 Blanko povas sin-vivigi kaptante internan nigran ŝtonaron, pligrandigante ĝin per B-6.




Fig. 1-a




Fig. 2-a

(cititaj el ĵurnalo “Go Semajno”)